

# Uzmaniero de SITELEN PONA enhavata en la tiparo Nishiki-teki

https://umihotaru.work/

2026-02-11 NOVIGITA: Nove aldonitaj elementoj estas montrataj ruĝe.

Reviziitaj elementoj estas montrataj blue.

**Nishiki-teki** enhavas la literojn *sitelen pona* laŭ UCSUR, kaj iliaj kodpunktoj estas U+F1900 - U+F19FF.

http://www.kreativekorp.com/ucsur/charts/sitelen.html

## Sitelen Pona: U+F1900 - U+F19FF




Ĝi ankaŭ subtenas sufiĉe da kunmetitaj literoj.




Por prezenti kartuŝon, kiu kadras propran substantivon, uzu la signojn **U+F1990 KOMENCO DE KARTUŜO** kaj **U+F1991 FINO DE KARTUŜO**. Literoj inter ambaŭ signoj estos kadrita aŭtomate.

U+F1990 START OF CARTOUCHE (
U+F1991 END OF CARTOUCHE )




Per metado de **U+F199E KOMBINADA NOMBRSTREKO** post la signoj ene de la kartuŝo, la notacio de *nasin sitelen kalama pi linja lili* povas esprimiĝi.

U+F199E COMBINING TALLY MARK



Uzi **U+309B KATAKANA-HIRAGANA VOĈSONA SIGNO** aŭ **U+309C KATAKANA-HIRAGANA DUONVOĈSONA SIGNO** ene aŭ tuj post la kartuŝo povas reprezenti *kalama wan nimi*, noma notacio fare de jan Toluneko.
Tamen, en iuj aplikoj ĝi eble ne montriĝas kiel intencite.


U+309B KATAKANA-HIRAGANA VOICED SOUND MARK ゛
U+309C KATAKANA-HIRAGANA SEMI-VOICED SOUND MARK ゜



Por skribi longan literon *pi*, kies malsupra streko longiĝas ĝis sekvaj literoj, metu la signon U+F1997 KOMENCO DE LONGA SIGNO tuj post U+F194D SIGNO PI, kaj malantaŭe de kelkaj sekvaj literoj metu la signon U+F1998 FINO DE LONGA SIGNO por indiki la ekstremaĵon.
Tio funkcias same kun ankoraŭ aliaj pluraj literoj krom *pi*, konkrete:




U+F1997 START OF LONG GLYPH 
U+F1998 END OF LONG GLYPH 



La literoj X Y Λ ᐅ ) ∸ ρ III # ᓄ I = ¦ povas longigi sian malsupran strekon maldekstre. Por tio, uzu la signojn U+F199A KOMENCO DE INVERSA LONGA SIGNO kaj U+F199B FINO DE INVERSA LONGA SIGNO.
X Y Λ ᐅ ∸ III # I = povas longiĝi ankaŭ ambaŭdirekte.

U+F199A START OF REVERSE LONG GLYPH 
U+F199B END OF REVERSE LONG GLYPH 



Ankaŭ subtenas tion, kio troviĝas en tiparoj de *Kreative*.




Aldone, sekvante ĝin, ankaŭ ĉi tion.




Por formi kunmetitan literon, metu unu el la signoj U+200D NULO-LARĜA KUNIGILO, U+F1995 STAKIGA KUNIGILO kaj U+F1996 ENVOLVA KUNIGILO inter du literoj.
La signo U+F1995 aperigos formon ke la sekva litero surmetiĝas sur la antaŭa litero.
La signo U+F1996 aperigos formon ke la sekva litero estas envolvita ene de la antaŭa litero. Tamen, se la antaŭa litero estas tiel forma, ke alia signo ne povas esti metita enen, la rezulto estos la sama kiel uzi U+F1995.
U+200D aperigos unu el ambaŭ formoj, kiu aspektas pli konvena. En kelkaj kombinaĵoj, la formoj povas aspekti malsamaj de iu el la supraj.


U+200D ZERO WIDTH JOINER
U+F1995 STACKING JOINER
U+F1996 SCALING JOINER




Estas kelkaj kombinaĵoj, kiuj aperigas iom unikajn formojn.



Se signovico konsistanta el 1, II kaj √∩, kiu signifas iun nombron el 1-20, ligiĝas per la kunigiloj, ĝi prezentiĝas kiel kunmetaĵo.






**Formoj de jenaj literoj povas esti ŝanĝitaj per variaĵaj elektiloj.**

U+FE00 VARIATION SELECTOR-1
U+FE01 VARIATION SELECTOR-2
U+FE02 VARIATION SELECTOR-3
U+FE03 VARIATION SELECTOR-4
U+FE04 VARIATION SELECTOR-5
U+FE05 VARIATION SELECTOR-6
U+FE06 VARIATION SELECTOR-7
U+FE07 VARIATION SELECTOR-8






Kompreneble, ankaŭ ĉi tiuj variaĵoj povas esti komponantoj por kunmetaĵoj.



**Estas specialaj kombinaĵoj por kelkaj *nimisin*.**

 omekalike

 kuntu

 peto

 omen


 wasoweli

 wekama

**Kaj paskaj ovoj…** 🥚

 (kulupu) PaliPape


 ma toki pona VR

 ma pona pi toki pona


 Linku

 lipu tenpo


 telo sitelen

 suno pi toki pona


 mun pi ante toki




Krome, la tiparo enhavas la jenajn signojn por *nimisin*, sed mi ankoraŭ ne asignis kodpunktojn al ili kaj ankoraŭ pripensas kiel trakti ilin



### Specimena teksto





# Kiel uzi la skribon TITI PULA en la tiparo Nishiki-teki


**Nishiki-teki** ankaŭ enhavas la literojn por *tuki tiki* nomatajn *titi pula*.
La kodpunktoj estas `U+F1C40 - U+F1C7F`.
https://www.kreativekorp.com/ucsur/charts/titi-pula.html

## Titi Pula: U+F1C40 - U+F1C7F




Per la signoj U+F1C7E KOMENCO DE KARTUŜO kaj U+F1C7F FINO DE KARTUŜO, oni povas estigi kartuŝon por titi pula.


U+F1C7E START OF CARTOUCHE
U+F1C7F END OF CARTOUCHE




Uzante la samajn stirsignojn kiel sitelen pona, oni ankaŭ povas formi kunmetitan literon.


U+200D ZERO WIDTH JOINER
U+F1995 STACKING JOINER
U+F1996 SCALING JOINER





Per la signoj U+F1997 kaj U+F1998, la litero *lu* povas prezentiĝi kiel linio etendiĝanta sub sekvaj literoj.

U+F1997 START OF LONG GLYPH
U+F1998 END OF LONG GLYPH



**Specimena teksto**
**(Originala teksto de ka Tumu, *lupa tiku lu kiku Papala*, kati tiki tu lili, p. 4)**
https://liputenpo.org/kati-tiki-tu-lili/

